

& La ursfelo:

< Rekante 21 el 37 batoj por strofo, entute 407 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigas Martin Strid (2015) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por Konfeso.>

(#Melodio:

<:37> (

/dodo dore doTi LaSo; dodo dore mimi mimi; mifa soso somi mire; dore doTi LaLa LaSo;

(#Rekantaĵe: do mire do dodo Ti La; LaTi dodo dore mimi; mifa somi mire do; do mire do dodo Ti La a)

)×11)+

(&Strofoj:

'1 /Du kompanoj en drinkdomo ; pri ĉasadoj fanfaronis, ; ĉe l' apuda tablo homo ; miris, miris, kaj proponis:

(×:; **Zorgojn li foje forgesas ; Li pri felo tro promesas ; nek la urson venkis li; Zorgojn li ĝoje forgesas.**)

'2 "Aŭdu, ho ĉasistoj gloraj, ; urso tra l' arbaro vagas. ; Dudek kvin monerojn orajn ; mi por ties felo pagas."

'3 Ĉar la monon tiuj sentis ; jam tintadi en la poŝo, ; ĉion bonan ili mendis, ; drinkis ĝis la lasta groŝo.

'4 Poste ili venko-certe ; iris al la ĉasekskurso. ; Ili iris, ĝis averte ; unu kriis: "Jen la urso!"

'5 Urso, jes, sed ve, giganta, ; alta super arbitrunkoj, ; sovaĝege atakanta ; per la ulno-longaj ungoj.

'6 Terurite, la kompanoj ; ne kuraĝis lanci, pafi, ; ĵetis ĉion el la manoj ; kaj klopodis nur sin savi.

'7 l' unu grimpe sin defendis, ; rampis sur arbeg' ĝis pinto, ; la alia sin etendis ; sur la tero, kaj mortinto

'8 sin ŝajnigis (ĉar laŭdire ; urs' ne manĝas mortan homon). ; Rigidigis li senspire, ; ne montrante vivsimptomon.

'9 l' urso venis kaj lin flaris ; ĉe orelo, nazo, buŝo, ; sed nenion al li faris: ; Iris for sen ia tuŝo.

'10 Kuŝis li kun turna kapo ... ; Nun descendis la kolego, ; ŝercis, ĝoje pri l' eskapo: ; "Kion diris la ursego?"

'11 "Ho, ĝi flustris ĉe orelo ; ion, kion ni ne lernis: ; Tiam trinku je ursfelo, ; kiam vi la urson sternis."